# PARIZA FEDERACIO

FEDERATION PARISIENNE des CENTRES CULTURELS "ESPERANTO"

CCP 10482-04 Paris     4bis, rue de la Cerisaie 75004 PARIS     tél 278 68 86

MAJO - JUNIO 1975     N° 15

## N I A   K O N G R E S O   E N   E N G H I E N - L E S - B A I N S

Malgraŭ griza ĉielo kaj malvarma vetero, ĉirkaŭ sesdek personoj kunsidis la 9-an de marto 1975 en la Urba Festsalono de Enghien-les-Bains por partopreni en la Federacia Kongreso.

Kontraŭkutime, ni komencos per la dua parto de la kunveno, kiu estis la administra ero de tiu kongreso, malfermita per kelkaj bonvenaj vortoj de la prezidanto de la L.K.K. s-ro SAUDIAN-ROUSSEAU. Poste, la prezidanto de la Federacio, R.DESPINEY, metis antaŭ la publiko la raportojn pri agado kaj financo. Sekvis diskuto pri ili, antaŭ ol la grupestroj (aŭ ties reprezentantoj) prezentis siavice la agadon en 1974 de la diversaj grupoj de la federacio.

Je la fino de tiu parto, la prezidanto dankis ĉiujn partoprenantojn, kaj anoncis ke verŝajne, la venonta kongreso povus okazi en Rueil-Malmaison.

Sed ni revenu al la unua parto de tiu posttagmezo, dum kiu oni prezentis du skeĉojn de BUKAR, "Sendormema nokto" kaj "Nutradistiko". Tiuj du novaj verketoj, originale skribitaj en la Internacia Lingvo, tre plaĉis al la ĉeestantaro, kiu dankis la geaktorojn per fortaj kaj longdaŭraj aplaŭdoj.

Kun plezuro, oni konstatis ĝeneralan plibonigon de la ludo. Tio estis la rezulto de longa preparado de tiu programo. Malmultaj el niaj membroj scias, ke la rolojn oni jam studis en pasinta septembro, tio estas do ses monatoj antaŭ la prezentado !

Kiel interakto, ni aŭdis Dominique DESPINEY kiu, akompanata de sia gitaro, kantis "La rozo kaj konval'" (G.Béart), kaj f-ino Barbara ZOCHOWSKA kiu tre poezie deklamis, en la traduko de prof-ro WARINGHIEN, la famkonatan soneton de ARVERS.

Entute tre kontentiga ero de nia kongreso. Tial, ni ne forgesos ĉiujn geaktorojn en la dankoj, kiujn ni direktas aliflanke al ĉiuj, kiuj laboris logtempe por la sukceso de tiu renkontiĝo.

Jack-André ROUSSEAU

---

Je la fino de la ĝenerala asembleo de la kongreso la prezidanto de la pariza federacio alparolis la ĉeestantaron :

(vidu ĉe la 2-a paĝo)

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

-o-o-o-

ESPERANTO estas 87-jara. Dum tiu tempo ESPERANTO-MOVADO ne monotone kreskis. Kontraŭe ĝi trapasis feliĉajn momentojn kaj suferis pro teruraj afliktoj. Por venki la esperantistoj devas batali. Ili devas batali kontraŭ tri specoj de malamikoj : la eksteraj malamikoj , la internaj malamikoj , la indiferenteco de la homamasoj.

Niaj eksteraj malamikoj estas tiuj, kiuj ne volas, ke ESPERANTO fariĝu la adoptita Internacia Lingvo. Ili volas, ke nur lia propra solvo estu adoptita. Feliĉe por ni ili estas pluraj kaj malsamaj : dulingvistoj, latinistoj, novlatinistoj, adeptoj de diversaj artefaritaj lingvoj ...ktp...ktp...

Niaj internaj malamikoj estas tiuj, kiuj vivas en ĉiu el ni : orgojlo, malmodesteco, manko da kuraĝo, da sindono, da amo al la aliaj. Ankoraŭ internaj malamikoj estas tiuj, kiuj estas meze de ni : en niaj grupoj, en nia nacia aŭ internacia movado.

Fine, ni devas batali kontraŭ TRIA malamiko , nome, IN DI FE REN TE CO de la homamasoj, kiuj tute ne konas ESPERANTON.

Mi do alvenas al praktikaj admonoj :

1°) - Pri la eksteraj malamikoj mi konsilas ne tro perdi nian tempon batalante kontraŭ ili. Pli utile ni devas uzi nian tempon, niajn fortojn.

2°) - Kontraŭ niaj internaj malamikoj mi diros :Ke ĉiu el ni luktu kontraŭ siaj malvirtoj, siaj mankoj kaj penu por akiri novan spiriton. Ĉiu venko de iu esperantisto sur si mem estas venko por ESPERANTO ! Meze de niaj grupoj, ke regu prudento, modereco, singardemo tamen ligita al ia aŭdaco, uzo de intelingenta dialogo, konklude TEAMA SPIRITO.

3°) - Rilate la indiferentecon de la homamasoj, estas necese efike <u>informi</u> ilin pri Esperanto.

Se dum 87 jaroj la esperantistoj estus skribintaj tiom da linioj pri Esperanto nacilingve, kiom ili skribis esperante,

Se ili estus prononcintaj tiom da nacilingvaj vortoj por konvinki ne-esperantistojn, kiom ili vane prononcis por stulte babiladi, diskuti, klaĉi, kalumni...ktp...

Mi certigas vin ke Unuiĝo Franca por Esperanto ne havus nur 1300 membrojn sed dekfoje pli aŭ centfoje pli !

Konklude : Se multaj el vi , post medito de tiuj vortoj, ekagu laŭ ilia senco, kredu, karaj geamikoj, ke, en nia pariza regiono E S P E R A N T O S A L T E G O S A N T A Ŭ E N !

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

## A L D O N O

Karaj gesamideanoj, bonvolu ne konsideri tiujn vortojn kiel amarajn riproĉojn kontraŭ la multaj esperantistoj, kiuj ĝis nun faris tiom da bonegaj laboroj : laboroj, kiuj estas la bazo por nia nuna agado. Nia moderna epoko donas al ni novajn eblecojn, kiuj ne ekzistis antaŭe. Mi senlace ripetos ke la informado estas grava afero : laŭ mia opinio, la ĉefa afero.

Nia epoko estas tiu de la amaskomunikiloj (MASS MEDIA). Ni uzu ilin. Tio estas nepre necesa : Televido (*), radio (**), nacilingvaj verkoj (***), kanzonetoj, gazetaro, ekspozicio, afiŝoj, propaganfolioj ... ktp...ktp...

* - En majo U.F.E. sin prezentos en la kadro de la elsendo : TRIBUNE LIBRE , 3ème chaîne, je la 19.40 H. ( bonvolu atente konsulti la programon en via ĵurnalo )

** - Antaŭ ne longe kelkaj radio-elsendoj disvolvigis informojn pri Esperanto.

*** - Ni salutu la kvar librojn : "Vocabulaire espéranto" de M. Duc-Goninaz, "L'Epéranto" de P. Janton, "Je parle espéranto" kaj"l'Espéranto sans peine" de J.Thierry.

R.D.

- - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - -

NOVA ESTRARO DE U . F . E .
(baloto en TOURS)

| | |
|---|---|
| Prezidanto | S-ro GONIN Hervé |
| Vic-prezidantoj | S-ro DESPINEY Roger |
| | S-ro GUILLAUME Jean |
| | S-ro LE MAGADURE Frédéric |
| | S-ino VINCENT Jeannine |
| Sekretariino | F-ino NOURMONT Claude |
| Helpsekretariino | F-ino TRIOLLE Renée |
| Kasisto | S-ro ROUSSEAU Jack |
| Membro | S-ro BABIN Pierre |

NOVA ESTRARO DE PARIZA FEDERACIO
(baloto en PARIZO)

| | |
|---|---|
| Prezidanto | S-ro DESPINEY Roger |
| Vic-prezidantoj | S-ro GUILLAUME Jean |
| | S-ro DELATTE Michel |
| Sekretario | S-ro BACHELIER André |
| Kasisto | S-ro ROUSSEAU Jack |

*******************
*******

# LA ARBAROJ DE LA PARIZA REGIONO

La arbaroj en la pariza regiono entutigas ĉiujn de la administraj centroj : Fontainebleau, Versailles kaj Rambouillet. Ili konsistas el 27 distriktoj kun 103 teknikagentejoj.

Statistikaj informoj :

| | |
|---|---|
| Surfacamplekco de la regiono= | 1 207 000 ha |
| Arbarsurfaco................ | 229 872 ha |
| Arbarsurfaco subordigita al la Forstadministracio........ | 61 911 ha |
| Arbarkovrita surfaco de la regiono = | 20 % |

Surfaco laŭ proprietuloj :

| | | |
|---|---|---|
| Ŝtataj forstoj= | 56 338 ha ) | 61 911 ha |
| Kolektivaj arbaroj(komunumaj)= | 5 573 ha ) | |
| Privataj arbaroj............... | | 167 961 ha |

Arbospecioj :

| | |
|---|---|
| Koniferoj............. | 6 % |
| Folioarboj............ | 94 % |

La ŝtataj kaj subordigitaj arbaroj konsistas el :

| | |
|---|---|
| Folioarbegaroj........ | 32,5 % |
| Koniferoj............. | 11 % |
| Stumpoŝosarbetaroj sub arbegoj.......... | 56,5 % |

Jaraj produktaĵoj :

| | |
|---|---|
| Trunkligno........... | 85 000 $m^3$ |
| Industriligno ......... | 18 000 $m^3$ |
| Brulligno............. | 150 000 steroj |

Ekonomia aspekto :

En Francujo oni kalkulas po 1 ha. da arbaro por 4 enloĝantoj, sed en la Pariza Regiono 37 enloĝantoj devas kontentiĝi je 1 ha. da arbarkovrita surfaco, kaj tiu areaĵo mal vastiĝas de jaro al jaro kvankam la responseculoj penas ampleksigi la areaĵon de la verdaj spacoj malfermataj al la publiko.
La dispartigo de la arbaroj ĉirkaŭ Parizo ne estas egala; la vastaj arbarmasivoj situas en la okcidento kaj sudo de Parizo kaj en la nord-oriento kaj oriento mankas spacoj verdaj.
La arbaroj en la pariza regiono estas sufiĉe homogenaj; ili estas el la tipo "ebenaĵ-arbaroj". La masivoj devenas preskaŭ ĉiuj el kverkarbaroj, pli malpli fordifektitaj kaj prizorgitaj,de nememorebla tempo, kiel stumpoŝosoarbetaroj, por produkti brul lignon.

Kverkoj, fagoj, karpenoj kaj diversaj foliarboj konsistigas esence la populaciojn . El la koniferoj nur la pinoj prezentas ian interesiĝon.
La arbaroj subordigitaj al la forstadministracio estas malpli ol la kvarono de la arbarkovrita surfaco. La arbegaroj estas ekspluatataj je 120-150 jara rivoluo; kaj la stumpoŝosarbetaroj je 12-30 jara.
Estas notinde ke nur la 60 000 ha. de ŝtataj forstoj estas nuntempe malfermataj al la publiko kaj estas, aŭ estos, aranĝataj por disponigi al la multnombraj vizitantoj ripoz-kaj ludlokojn, kiujn la moderna vivo igas pli kaj pli nepre necesaj.
Krom la grava socia rolo plenumata de la pariza regiona arbaroj, necesas substreki la bonfaron de la arbaraero en la kontraŭpolucia lukto; la ŝtataj forstoj konsistigas la unuan zonon verdan; kelkaj antaŭurboj estas en intima kontakto kun arbaro.
Ni estu fidema; la forstistoj de la O.N.F. (Nacia Forstofico) prizorgas kaj ekipas niajn arbarojn por plibonigi ilin, konservi ilian biologian ekvilibron kaj savi nian vivmedion.
Niaflanke ni ne rigardu la arbarojn kielrubujon por disŝuti en ili ĉiajn neutilaĵojn.

El la bulteno:
L'Office National des Forêts

tradukis J. KRAEMER

Glosaro :

Stumpoŝosarbetaro = Taillis issu de rejets de souches.

Stumpoŝosarbetaro sub arbegoj = Taillis sous futaie.

Populacio = arbarkonsisto = peuplement d'arbres; association d'arbres sur une certaine étendue, faisant l'objet d'un traitement déterminé.

Arbegaro = futaie.

subordigita ou submetita = soumis (au régime forestier par ex.)

Rivoluo = révolution = période depuis la naissance jusqu'à la coupe.

Foliarbaro aŭ laŭ P. Neergard: Falfoliarbaro = Forêt composée de feuillus : chênes, hêtres, charmes...etc...

---

Ni estas tre danka al S-ro KRAEMER por lia amikeca kunlaborado oferta de li, kvankam li ne plu estas ano de la pariza Federacio.

R. D.

---

La homaro dividiĝas en 10 % da neredukteblaj egoistoj,
10 % da sindonemegaj homoj kaj
80 % da individuoj, kies konscienco dormas.

NECESE ESTAS VEKI ILIN.

P. PIRE 1958 Nobel-Premio de l'PACO.

-0-0-0-0-0-0-0-0-0-0-0-0-0-0-

KARAVANO AL KOPENHAGO

Alloga vojaĝo estas organizita de U.F.E. Nia amiko André BACHELIER, respondeculo de tiu organizo, atentigas la interesitojn, por ke ili sin enskribu nepre antaù la 15-a de majo 1975.

Informoj : UFE: 4 bis, rue de la Cerisaie.

- - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - -

POŜTMARKOJ KOLEKTITAJ

UFE nun kolektas ĉiajn poŝtmarkojn kaj klopodas trovi aĉetontojn. Do : por helpi la financojn de UFE bonvolu sendi al la sidejo viajn uzitajn poŝtmarkojn. Antaùan dankon !

- - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - -

VIZITO DE LA PREZIDANTO DE U.E.A.

D-ro Humphrey TONKIN, nova prezidanto de UEA, vizitis plurajn esperantistajn respondeculojn en Parizo, en la sidejo de UFE , la 8-an kaj 9-an de aprilo 1975 .

- - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - -

NOVAJ KURSGVIDANTINOJ

Post S-ino BAUDRY, kursgvidantino en MGEN (Parizo), nun du aliaj esperantistinoj malfermis kurson :

S-ino DROUARD, en Dammarie-les-Lys en la "Maison des jeunes et de la culture" , kaj

S-ino NICAISE, en liceo de Versailles.

Ni varme gratulas ilin kaj bondeziras al ili plenan sukceson !

NI GRATULAS

* Nia amikino JULIETA vic-delegito, dumviva Membro de U.E.A., kiu verkis la faman gvidlibron TRA PARIS, ricevis la bronzan medalon de la urbo PARIS, la 15-an de februaro 1975.

* S-ro Léon AGOURDINE, ano de la pariza federacio, loĝanta en Okc. Berlino, esperantisto ekde 1911, eks-ĵurnalisto kaj historiisto, festis sian 80-an naskiĝtagon la 7an de aprilo.

* S-ro Pierre ROBIOLLE sukcesis la ekzamenon pri kapableco kaj tiel alportas brilan finpunkton al nia listo de rezultatoj pri ekzamenoj 1974-1975 en nia federacio.

- - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - -

IMITINDAJ PROPAGANDAGOJ

* Okaze de ekspozicio pri radio-amatoroj en Boulogne-Billancourt (5-6-7- APR), E°-grupo de Rueil-Malmaison prezentis taùgajn E-aĵojn.

* Okaze de la 3-a Festivalo pri Artoj & Kulturo en Le Perreux (26/4 - 4/5) la C.C.E.P. substrekis la facilecon donitan de Esperanto en la rilatoj de la freŝdate ĝemelitaj urboj Le Perreux kaj Forchheim, kaj anoncis,ke esperantistoj de Nurenbergo estas pretaj malfermi E°-kurson en Forchheim.

- - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - -

INTERESPLENA INFORMO

En nia sidejo estas disponeblaj diversaj filmoj pri Novzelando, Fiat, Thiers (industrio pri tranĉiloj) kaj la fama "Angoroj".

-0-0-0-0-0-0-0-0-0-0-0-0-0-0-0-0-0-0-0-0-0-0-0-0-0-0-0-0-0-0-0-0-0-0-0-0-0-0-0-0-0-0-0-0-0-0-

## K A L E N D A R O

| | |
|---|---|
| MAJO | |
| 4 | Arbaruma dimanĉo de la grupo de Parizo en LYONS-la-Forêt |
| Atentu | la konsilia kunveno de la pariza federacio ,antaùvidita la 10-an de majo, NE OKAZOS, ĉar tro da konsilianoj ne povos ĉeesti pro la ferioj de la Ĉieliro. |
| 17-19 | Kongreso de Franca Katolika Esperanto Asocio en LILLE |
| 24 | Ekzamenoj en la sidejo |
| JUNIO | |
| 14 | Konsilia kunveno, ĉe Cerisaie je la 14.45 H. |
| 22 | Promenado en la arbaro de Fontainebleau (vidu ĉe paĝo 6-a) |
| 29 | "RALLYE"-Esperanto en ESSONNE (vidu ĉe paĝo 5-a) |
| JULIO | |
| 26/2 aùg. | UNIVERSALA KONGRESO EN KOPENHAGO (Danlando) |

DIMANCHE 29 JUIN 1975

## 4 - ème JOURNEE dans l'ESSONNE

### * ESSONNE - ESPERANTO :

proponas al la esperantistoj kaj al iliaj amikoj :

1°) - "RALLYE"-ESPERANTO en ESSONNE

9 ĝis 12 H. Turisma promenado per demandoj kaj ludoj.

Rendevuo je la 9-a H. antaŭ la parkejo de stacidomo de BRETIGNY.

Ne forgesu: planonN° 91, krajonon,tondilon, francan vortaron....kaj bonhumoron.

2°) - TAGMANĜO en SAINTE-GENEVIEVE

12.30 H. tagmanĝo donacota de Associo RENAISSANCE ET CULTURE en salono de là urbodomo.

Limdato por la enskribo : 15 junio

aliĝprezo : nur 8 F. po persono

propose aux espérantistes ainsi qu'à leurs amis :

1°) - RALLYE - ESPERANTO dans l' ESSONNE

de 9 à 12 H. promenade touristique avec questions et jeux.

Rendez-vous à 9.00 H. devant le parking de la gare de BRETIGNY.

N'oubliez pas : carte N° 91, crayon, ciseaux, dictionnaire français....et de la bonne humeur.

2°) DEJEUNER A SAINTE-GENEVIEVE

12.30 H. dejeuner offert par l' Association RENAISSANCE ET CULTURE dans les salons de la mairie.

Date limite pour l'inscription : 15 juin

adhésion : 8 F. seulement par personne

3°) - GRANDA EKSPOZICIO
( festsalonego GERARD PHILIPE)

15.00 H. pentrado, muziko, arkitekturo, skulptarto, filmoj .

16.00 H. Esperanta filmo pri arkitekturo

16.30 H. Rezultato de "RALLYE" kaj premioj.

3°) - GRANDE EXPOSITION
( Salle des fêtes GERARD PHILIPE )

15.00 H. peinture, musique, architecture, sculpture , films.

16.00 H. Film sur l'architecture (en Espéranto.

16.30 H. Résultat du RALLYE et prix.

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o

1°) - Bureau temporaire PTT pendant l'Exposition avec émission d'un cachet spécial illustré.

2°) - Une enveloppe spéciale représentant le Donjon de Sainte-Geneviève-des-Bois (13e s) sera affranchie avec les 2 timbres Europa 75 (tableaux de peinture de maîtres).

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o

Bulletin de réservation à adresser avant le 15 juin à

S-ro HENRY Hugues 9, résid. Rochebrune 91220 BRETIGNY
avec mandat joint à l'intention de HENRY H. CCP 14540 . 54 Paris

- - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - -

Nom : Prénom :

Adresse :

Moyen de transport utilisé : Auto : [ ] Train (Austerlitz) : [ ]

Nombre de places disponibles dans ma voiture : ........

DEJEUNER : Nombre de personnes : x 8 =

Montant du mandat joint = ....... francs

DIMANCHE 22 JUIN 1975

## PROMENADO TRA LA ARBARO DE FONTAINEBLEAU

La Esperantista Klubo de la Junulkulturdomo de Dammarie-les-Lys organizas promenadon tra la arbaro de Fontaineblean dimanĉon la 22-a de junio.

Ĉiujn esperantistojn de la pariza regiono ni invitas.

* Rendevuo je la 10a antaŭ la stacidomo de Fontainebleau. ( trajno eliranta el Parizo-stacidomo de Lyon je la 9.02 H., sed kontrolu la horaron post la 1a de junio, dato de ŝanĝo al somerhoraro : bondimanĉa fervoja bileto)

* Amika kunveno kaj tagmanĝo sur herbo (manĝo eltirita el la sako) apud Turo Denecourt. (oni ankaŭ povas manĝi kaj trinki en bufedeto de la Turo)

* Promenado iren kaj reen : 3 aŭ 4 horojn marŝante sen peno. (Estas eble por tiuj, kiuj volas marŝi malpli longe, sekvi pli rektan vojon aŭ eĉ veturi rekte al Turo Denecourt) .

* Enskribiĝo antaŭ la 17a de junio :

## PROMENADE DANS LA FORET DE FANTAINEBLEAU

Le club espérantiste de la maison des jeunes et de la Culture de Dammerie-les-Lys organise une promenade en forêt de Fontainebleau le dimanche 22 juin.

Tous les espérantistes de la région parisienne sont invités.

* Rendez-vous à 10 H. devant la gare de Fontainebleau. (train partant de Paris-gare de Lyon à 9.02 H., mais vérifiez l'horaire après le 1-er juin , date de passage à l'horaire d'été - Billet "bon dimanche" .

* Réunion amicale et déjeuner sur l'herbe. (repas tiré du sac) à la Tour Denecourt. (on peut aussi manger et boire à la buvette de la Tour).

* Promenade aller et retour: 3 à 4 heures de marche sans effort. (possibilité pour les personnes voulant moins marcher de suivre un trajet plus court, ou même d'aller directement en voiture à la Tour Denecourt.

* Inscription avant le 15 juin :

ESPERANTO - KLUBO
M J C tél. 437.31.14
44, allée de la Justice 77190 DAMMARIE-LES-LYS

* Kosto : 5 pm je 0,80 F.

frais : 5 timbres à 0,80 F.

---

La materialo de la venonta bulteno nepre devos alveni antaŭ la 21-a de aŭgusto al R.Despinoy 43, quai de Champagne 94170 LE PERREUX

---

AL ĈIUJ MI BONDEZIRAS BONEGAJN FERIOJN .

R . D .